# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

vendredon, la 7-an de Julio, 2017 • numero kvar

## Hodiaŭ

★ **7:15 atm:** Matenmanĝo

★ **8:30 – 12:15 ptm:** Lecionoj

★ **12:30 ptm:** Tagmanĝo
Rimarku denove la novan horon. La redaktoro esperas, ke ekde nun pliaj ŝangoj ne necesos. 😱


★ **2:00 – 3:00 ptm:**
Duncan CHARTERS prelegos pri **"Novaj aliroj al la gramatiko de Esperanto"**. Vidu resumon sur la dua paĝo.
*Flowe 110*

★ **3:15:** Paulo Sérgio VIANA prelegos pri **"La deveno de la nomo 'Brazilo'"** (pli-malpli 20 minutoj)
*Flowe 110*

★ **5:30 ptm:** Vespermanĝo
Atentu! Bonvolu eliri la manĝejon antaŭ 6:30 ptm.

★ **7:00 – 8:00 ptm:** Laborsesio de KTF – **Koruso**
*Flowe 110 (kontrolu la blankan tabulon in Flowe 110 pri ebla lokoŝanĝo)*

★ **8:00 ptm:** Sinĝeno KARP amuzos nin per **humura parolo**
*Flowe 110*



# Rakonto de la Nordokcidentaj Teritorioj de Kanado

*de Sheila (Ŝila) DEVLIN*

Preparante por mia unua tago de laboro ĉe Volframo-Minejo de Kanada (*Canada Tungsten Mines*), mi aŭskultis la ĉefon de la teamo de geologista esploro. "La tri junaj virstudentoj de geologio ne ĉiam laboras diligente", li diris. "Mi volas ke vi raportu al mi, kio okazas dum la labortago hodiaŭ, kiam vi ĉiuj revenos al la minejo." Mi sentis min iom kiel spionino, sed mi jesis.

Helikoptero transportis min kaj la tri studentojn ĝis la neĝlimo de la monto. Estis julio sed neĝo iomete kovris la rokojn. La tri junuloj kun la ekipaĵo eliris la helikopteron unue kaj mi laste. Sekvanta ilin, mi rimarkis ion kiun kaptis mian atenton. Estis birdo kun plumoj duonblankaj, duonbrunaj. Ekkreskis en mi deziro esti ĉasisto. Mi nur havis neĝbulon kiel kaptilo.

"Ha!" mi flustris. "Mi havos bonan manĝaĵon ĉi vespere."

Mia unua neĝbulo flugis al la birdo. Nenio okazis. Ŝajnis ke la birdo respondis, "Vi estas vere malbona ĉasisto! Provu denove."

Do mi lanĉis la duan neĝbulon kaj ĉi-foje ĝi atingis la celon. La birdo malsuprenfalis kaj mi tuj rapidegis al ĝi por tordi la kolon.

Tiam mi devis zorgi pri la tenado de mia vespermanĝo. Serĉinte ŝnuron en mia poŝo, mi ligis la piedojn de la birdo al la zono de miaj pantalono kaj kovris ĉion per jako. Rapidante al la kunlaborantoj, mi rimarkis strangan aspekton en iliaj vizaĝoj.

"Kio okazis", mi demandis.

"Vi havas sangon sur la vizaĝo", respondis unu el ili.

Malfermante la jakon mi nur diris "Mi kaptis la vespermanĝon".

La cetero de la tago disvolvis sen problemoj. Ĉio estis en ordo. Ĉiuj laboris diligente kaj neniu tro ripozis dum la meztagmanĝo.

Tiun vesperon, anstataŭ mi, la tri studentoj trovis la teamĉefon por priskribi la okazajojn de la tago. La sekvan tagon, oni metis min en la oficejon por lerni la taskon surpaperigi la notojn de esplorado.

Tiel finiĝis mia kariero kiel ĉasisto.

# #NASK2017 estas nia kradvorto

*de la redaktoro*

Ĉu vi uzas la servojn de *Facebook*, *Twitter*, aŭ *Instagram*? Se vi afiŝos pri NASK dum la venontaj tagoj, bonvolu uzi la kradvorton **#NASK2017**. Tiel ni ĉiuj povos ne maltrafi viajn fotojn, filmetojn kaj spritajn rakontetojn.

Eble la plejmulto de la NASKanoj jam estas membroj de la *Facebook*-grupo "NASK 2017". Sed ekzistas ankaŭ grupo en la servo *Telegram*, kiun oni povas uzi per poŝtelefonoj. Uzante *Telegram*-on, oni povas tuje mesaĝi al la tuta grupo. Por aliĝi al la NASKa grupo, unue instalu la programon en via poŝtelefono kaj poste vizitu la jenan ligilon per la poŝtelefona retumilo: **t.me/nask17**

**AVIZO**

*Lasta momento! Vendredon, je la 3a ptm fermiĝas la aliĝebloj al la KER-ekzamenoj!*

*Universitato William Peace ne permesas fumadon aŭ alkoholaĵojn en la universitata tereno*

# La angulo de la verkemulo

*de Jorge Rafael ("Rafa") NOGUERAS*

Ĉu vi ŝatus verki ion por la Fasko, sed vi ne scias kion? Mi helpu vin! Mi proponos al vi la lastan frazon de rakonto, kaj vi simple devas skribi tion, kio okazis antaŭe! Via rakonto povas esti longa nur unu aŭ du frazojn, tutan alineon, aŭ eĉ pli, laŭplaĉe.

Jen eblaj lastaj frazoj por veki vian imagpovon:

- Kiam la ĉasisto vekiĝis, li rimarkis ke la lupo celis al li per pafilo.
- "Kompreneble, post ĉio tio, mi neniel uzos United Airlines iam ajn!!!"
- Tial la knabino komprenis kial oni ĉiam diru ne, kiam sorĉistino demandas: "Ĉu vi volas uzi mian magian balailon?"
- Kaj fakte, la bleko de la drako estis la lasta sono, kiun li iam ajn aŭdis.
- La pordo de la kelo fermiĝis, kaj la mallumo glutis ŝin.

Mi antaŭĝojas legi la rakontojn, kiujn ni verkos kune dum NASK!

# Novaj aliroj al la gramatiko de Esperanto

*Jen resumo de la prelego, kiun D-ro Duncan CHARTERS prezentos hodiaŭ. La prelego okazos en granda ĉambro de la konstruaĵo* Flowe *je la dua posttagmeze.*

En la lastaj jardekoj la pedagogie aplikata lingvistiko evoluis laŭ vojoj malsimilaj al la "tradiciaj" gramatikaj klarigoj, kiuj en Usono celis komprenigi la gramatikon de aliaj lingvoj surbaze de la formala gramatiko konata de anglalingvanoj, antaŭe ofte bazita rekte sur la latina lingvo.


La nova pedagogia lingvistiko intencas komprenigi al la lernantoj la intuiciojn de fluparolantaj uzantoj de la celllingvo, kaj la regulojn kiuj regas tiujn intuiciojn. Ĝi celas pli klare kaj pli efike instrui la komprenon kiu rezultigas en la lernanto maksimume seneraran uzadon de la strukturoj de la lingvo.

Kiel tiu aliro povas helpi solvi la problemojn de sisteme erara uzado de la gramatiko fare de anglalingvaj lernantoj de Esperanto?

## Unua nokto en la gufuo



*Oni raportas, ke la gufujo ege furoris dum sia unua nokto. Tiom multe da "gufoj" venis, ke ili plenigis ne nur la 4-etaĝan salonon, sed ankaŭ la balkonon kaj la salonon en la 3a etaĝo. La lasta gufo restis ĝis noktomezo.*



# Haveblaj libroj en la Liĉjejo

| Libro | Prezo | Notoj | Haveblaj ekzempleroj |
|---|---|---|---|
| *Winnie-la-Pu* | $12 | Tute nova | 3 |
| *Esperanto Mini-Course*, eldonita de Esperanto Association of Britain | $2 | Tute nova | 3 |
| *Faktoj kaj Fantazioj* (Boulton) | $8.50 | Uzita sed bonstata | 1 |
| *Teach Yourself Esperanto* | $7-$9 | 3-a kaj 2-a eldonoj | 2 |
| *English-Esperanto-English Dictionary* (John Wells) | $6 | "Wells-vortaro", unua eldono | 1 |
| *Esperanto: Learning and Using the International Language* (Richardson) | $4 | | 1 |

Mi havas kelkajn librojn por vendi, se iu interesiĝas. Mi ĉefe akiris ilin per Ebay dum la jaro, por revendi kontraŭ la prezo kiun mi pagis. Kontaktu min se vi volas aĉeti ion.

-Liĉjo